Karlo Markso

# Parolado pri la demando de liberkomerco

kun antaŭparolo de Frederiko Engelso

**Karlo Markso**

# Parolado pri la demando de liberkomerco

**kun antaŭparolo de Frederiko Engelso**

Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano

**Monda Asembleo Socia (MAS)**

Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco, farita la 9-an de januaro 1848 en la Demokrata Socio en Bruselo; laŭ la „Discours sur la question du libre échange, prononcé à l'Association Démocratique de Bruxelles”. Bruselo 1848.

Antaŭparolo de Frederiko Engelso al la usona eldono de Karlo Markso: „Parolado pri la demando de liberkomerco”, verkita en aprilo ĝis komence de majo 1888. Laŭ: *Die Neue Zeit*, 6-a jaro, kajero 7, julio 1888.

Ambaŭ tekstoj tradukitaj de Vilhelmo Lutermano el la germana kaj la franca.

Karlo Markso: Parolado pri liberkomerco
kun antaŭparolo de Frederiko Engelso
Tradukitaj de Vilhelmo Lutermano
Monda Asembleo Socia (MAS)
Embres-et-Castelmaure 2009
ISBN 978-2-918300-02-1

# Enhavo

Frederiko Engelso:
Dogana protekto kaj liberkomerco.........................8
Karlo Markso:
Parolado pri la demando de liberkomerco...........30
Postparolo de la tradukinto.................................51

# Frederiko Engelso:
# Dogana protekto kaj liberkomerco

*Antaŭparolo de 1888*

[Antaŭparolo al la usona eldono de Karlo Markso: „Parolado pri la demando de liberkomerco”[1]
Verkita en aprilo ĝis komence de majo 1888.[2]
Laŭ: *Die Neue Zeit*, 6-a jaro, kajero 7, julio 1888.]

Je la fino de 1847 okazis en Bruselo kongreso pri liberkomerco.

Tio estis strategia manovro en la tiama liberkomerca kampanjo de la anglaj fabrikistoj. Hejme venkaj, per la nuligo de la grenleĝoj 1846, ili nun travojaĝis la kontinenton kun la postulo, kontraŭ la libera akcepto de la kontinenta greno en Anglujo permesi al la anglaj industriproduktoj liberan aliron al la kontinentaj merkatoj. En tiu kongreso Markso enskribis sin en la parolanto-liston; sed kiel atendeble, la afero aranĝeblis tiel ke la kongreso estis fermita antaŭ ol Markso ricevis la parolon. Tiel Markso estis devigata prezenti tion, kion li intencis diri, en

1 Antaŭparolo (tradukita de la aŭtoro) al la en Novjorko aperanta angla eldono de la parolado de Markso pri la demando de liberkomerco (germane de E. Bernstein kaj K. Kautsky, aldonaĵo II al Markso: „Elend der Philosophie”, Stutgarto, Dietz, p. 188s.). - Ĉar tiu antaŭparolo estas ĉefe destinita por usona publiko, la germana politiko de protekta doganaĵo povis esti nur preterpase tuŝata. La aŭtoro tamen trovos certe baldaŭ okazon pritrakti la demandon ankaŭ speciale kun rilato al Germanio.

2 Esperantigita el la germana versio de Engelso. Piednotoj faritaj de la tradukinto, same kiel partoj de piednotoj de li, estas signitaj per lia siglo (-vl). -vl

la Demokrata Socio de Bruselo, en internacia asocio, kies vicprezidanto li estis.

Ĉar la demando pri protekta doganaĵo aŭ liberkomerco staras en Usono en la momento sur la tagordo, oni opiniis utila anglan eldonon de la Marksa parolado kaj instigis min provizi ĝin per kelkaj enkondukaj vortoj.

*„La protektsistemo estis arta rimedo por fabriki fabrikistojn, eksproprietigi sendependajn laboristojn, kapitaligi la naciajn produktad- kaj viv-rimedojn, perforte mallongigi la transiron el la praa en la modernan produktadmanieron”* (Markso, „Kapitalo”, I-a vol., 3-a eld., p. 783). Tio estis la karaktero de la protektdoganaĵo ĉe ĝia origino en la deksepa jarcento kaj tia ĝi restis ĝis la deknaŭa. La protektsistemo estis tiam la normala politiko de ĉiu civilizita lando en Okcidenteŭropo. La solaj esceptoj estis la germanaj ŝtatetoj kaj la svisaj kantonoj, ne ĉar malplaĉis la sistemo, sed pro malespero pri la ebleco apliki ĝin al tiom malgrandaj teritorioj.

Ŝirmata per tiu protektdoganaĵo estiĝis kaj evoluis en Anglujo en la lasta triono de la dekoka jarcento la sistemo de la moderna granda industrio, de la produktado per maŝinaro kaj vaporforto. Kaj kvazaŭ la ordinara protektdoganaĵo ne sufiĉus, oni uzis la militojn kontraŭ la franca revolucio por certigi al Anglujo la monopolon de la novaj industriaj metodoj. Dum pli ol dudek jaroj, anglaj militŝipoj tranĉis la rilatojn de la industriaj konkurantoj de Anglujo kun iliaj respektivaj kolonimerkatoj kaj samtempe malfermis tiujn merkatojn al la angla komerco. La disŝiriĝo de la sudamerikaj kolonioj disde siaj eŭropaj metropoloj, la konkero de ĉiuj gravaj francaj kaj nederlandaj kolonioj fare de Anglujo, la iom-post-ioma

subjugado de Hindio transformis ĉiujn ĉi landojn en klientojn por la angla industrio. Anglujo tiel kompletigis la hejme praktikatan doganprotekton per la liberkomerco trudata ĉie kie eblis al eksterlando. Danke al tiu feliĉa miksaĵo de ambaŭ sistemoj ĝi troviĝis fine de la milito 1815 en la posedo de fakta monopolo de la mondkomerco, almenaŭ por ĉiuj decidaj industribranĉoj.

Dum la sekvaj jaroj de paco tiu monopolo estis plu disvolvata kaj firmigata. La antaŭeco akirita dum la milito pligrandiĝis de jaro al jaro; ŝajnis ke Anglujo pli kaj pli postlasis ĉiujn siajn eblajn konkurantojn en granda distanco. Kaj efektive la eksportado de industriproduktoj en ĉiam kreskantaj kvantoj fariĝis vivnepra demando por Anglujo. Nur du obstakloj ŝajnis malhelpi: La import-malpermesoj kaj protektaj doganaĵoj de aliaj landoj kaj la import-doganaĵoj pri krudmaterialoj kaj nutraĵoj en Anglujo.

Tiel okazis ke la komerclibereco predikata de la klasika politika ekonomio - de la francaj fiziokratoj kaj iliaj anglaj posteuloj Adam Smith kaj Ricardo - populariĝis en la lando de John Bull. Enlanda doganprotekto estis senutila por fabrikistoj kiuj superis ĉiujn eksterlandajn konkurantojn, kaj kies ekzisto rekte dependis de la konstanta etendado de ilia eksporto. Doganprotekto hejme estis avantaĝa jam nur por produktantoj de nutraĵoj kaj de aliaj krudmaterialoj, por terkulturo; tio signifis en la tiama Anglujo: por la ricevantoj de grundrento, la grundposedanta nobelaro. Por la fabrikistoj tiu doganprotekto estis, male, rekte malutila. En tio ke ĝi impostis krudmaterialojn, ĝi altigis la prezon de la laboro; ambaŭkaze ĝi malavantaĝigis la britan fabrikiston kontraŭ la eksterlandan. Ĉar la ceteraj landoj sendis

al Anglujo ĉefe terkulturajn produktojn kaj ricevis de Anglujo ĉefe industriproduktojn, la nuligo de la anglaj protektdoganaĵoj pri greno kaj krudmaterialoj entenis nerekte jam la postulon al eksterlando siavice nun forigi aŭ malpliigi ankaŭ siajn import-doganaĵojn pri anglaj industriproduktoj.

Post longa kaj akra batalo la anglaj industrikapitalistoj venkis; ili estis tiam fakte jam la gvida klaso de la nacio, la klaso kies interesoj estis en la momento ankaŭ la naciaj interesoj. La terposeda nobelaro devis kapitulaci. La doganaĵoj pri greno kaj krudmaterialoj estis nuligitaj. Liberkomerco estis nun la slogano. La venonta tasko de la anglaj fabrikistoj kaj de iliaj proparolantoj, la anglaj ekonomikistoj, estis nun, ĉien disvastigi la kredon je la liberkomerca evangelio kaj tiel krei mondon en kiu Anglujo estos la granda industricentro kaj la ceteraj landoj nur ĝia dependa terkultura teritorio. Tio estis la tempo de la Brusela Kongreso, la tempo de tiu ĉi parolado de Markso. Dum li agnoskas ke protekta doganaĵo povas daŭre esti utila en certaj cirkonstancoj, ekz-e en la tiama Germanio, al la industriaj kapitalistoj; dum li pruvas, ke la liberkomerco tute ne estas la laŭdata panaceo por ĉiuj suferoj de la laborista klaso, kaj male eĉ povas pligrandigi tiujn suferojn, li esprimas sin lastinstance kaj principe por la liberkomerco. Por li, liberkomerco estas la normala stato de la moderna kapitalisma produktado. Nur sub libera komerco la gigantaj produktfortoj de vaporo, de elektro, de la maŝinaro povas komplete evolui; kaj ju pli rapidas tiu evoluo, des pli rapide kaj des pli komplete aperos ĝiaj neeviteblaj sekvoj: la disfendiĝo de la socio en du klasojn, kapitalistoj ĉi tie, dunglaboristoj tie; hereda riĉaĵo je ĉi tiu, hereda malriĉaĵo je tiu flanko; troabundo de la oferto super la postulo, nekapablo de la merkatoj sorbi la ĉiam kreskantan mason de industriproduktoj;

konstante ripetiĝanta cirkulado de prospero, superproduktado, krizo, paniko, kronika ŝtopiĝo kaj iompostioma revigliĝo de la negoco; tiu ĉi ne kiel signo de daŭrema pliboniĝo, sed de estonta nova superproduktado kaj krizo; unuvorte, la sociaj produktadfortoj kreskantaj al tiom gigantaj dimensioj ke la sociaj institucioj, sub kiuj ili estis ekfunkciigitaj, fariĝas netolereblaj katenoj, nur *unu* ebla solvo: socia transformo, kiu liberigas la sociajn produktfortojn el la katenoj de la malnoviĝinta socia ordo kaj la verajn produktistojn, tio signifas la grandan popolamason, el la dungsklaveco. Kaj ĉar la liberkomerco estas la natura kaj normala atmosfero por tiu historia evoluo, la ekonomia medio en kiu la kondiĉoj de tiu neevitebla solvo naskiĝas plej rapide - pro tio kaj nur pro tio Markso deklaris sin por la liberkomerco.

Tamen la sekvaj jaroj post la venko de la liberkomerco en Anglujo ŝajnis plenumi eĉ la plej troigitajn atendojn de la nun sekvanta prospero. La brita komerco kreskis al fabela alteco; la industria monopolo de Anglujo en la mondmerkato ŝajnis esti pli firma ol iam ajn; novaj fandfornegoj, novaj fabrikoj estiĝis ĉiuflanke; novaj industribranĉoj elkreskis ĉie. Kvankam en 1857 venis grava krizo, tiu estis superita, kaj baldaŭ la avanco sur la tuta tereno de komerco kaj de industrio ree kaj plene floris, ĝis kiam en 1866 estiĝis nova paniko, kiu ĉi-foje efektive ŝajnas indiki novan epokon de la ekonomia mondhistorio.

La eksterordinara impeto de la industrio kaj de la komerco en Anglujo de 1848 ĝis 1866 estis nepre grandparte la sekvo de la forigo de la protektaj doganaĵoj pri krudproduktoj kaj nutraĵoj. Sed tute ne sole. Aliaj samtempaj okazaĵoj ege kontribuis al

tio. La menciitaj jaroj entenas la malkovron kaj ekspluatadon de la kaliforniaj kaj aŭstraliaj orminejoj kaj per tio enorman pliiĝon de la interŝanĝrimedoj sur la mondmerkato; ili signifas ĝeneralan transformiĝegon de la transportrimedoj por homoj kiel por varoj; sur la oceano la anstataŭigon de velŝipoj per vaporŝipoj, kaj surtere, ĝis tie kien la civilizita mondo atingas, de la ŝoseoj per fervojoj, tiel ke la fervojo fariĝas nun la precipa, la asfaltita vojo la subordigita komunikad-linio. Ne mirige ke en tiaj favoraj kondiĉoj la vapormovata angla industrio etendis sian superregadon malavantaĝe al la eksterlandaj hejmindustrioj bazitaj sur manlaboro. Sed kion la aliaj landoj povis fari? Ĉu ili sidu senmove kaj toleru humile ke ili estas tiom degraditaj al nuraj terkulturaj aldonaĵoj de Anglujo, „la monda metiejo”?

La aliaj landoj faris nenion tian. *Francio* de preskaŭ ducent jaroj protektis sian industrion malantaŭ kompleta ĉina muro de protektaj doganaĵoj kaj import-malpermesoj kaj akiris en ĉiuj artikloj de lukso kaj gusto superecon kiun Anglujo eĉ ne provis kontesti. *Svislando*, sub kompleta liberkomerco, posedis relative konsiderindan industrion, kiun la angla konkurenco ne povis tuŝi. *Germanio*, kun multe pli liberala tarifo ol tiu de iu ajn alia granda kontinenta lando, disvolvis sian industrion relative pli rapide ol eĉ Anglujo. *Usono* fine, pro la interna milito de 1861, subite dependiĝis de siaj propraj rimedoj, devis kontentigi subitan postulon de ĉiaspecaj industriproduktoj kaj povis tion nur per kreado de sia propra enlanda industrio. La milita postulo ĉesis kun la milito; sed la nova industrio ekzistis kaj devis alfronti la anglan konkurencon. Kaj la milito maturigis en Usono la komprenon, ke popolo de tridek-kvin milionoj, kun la kapablo duobligi sian nombron en plej longe kvardek jaroj, kun preskaŭ nelimigitaj ĉiaspecaj resursoj, ĉirkaŭataj de najbaroj kiuj

dum jaroj devos esti esence terkulturaj, ke tia popolo havas „la evidentan destinon” fariĝi por siaj precipaj konsumartiklo sendependa de fremdaj industrioj, kaj tio dum paco kiel dum milito. Kaj post tio Usono enkondukis la protektan doganaĵon.

Antaŭ proksimume dek-kvin jaroj mi vojaĝis en fervoj-vagono kun inteligenta glasgova komercisto, kiu havis apartan intereson pri fero. La babilado tuŝis Usonon. Li regurdis la konatajn dirojn pri liberkomerco: Ĉu ne estas nekompreneble ke ruzaj komercistoj kiel la usonanoj pagas tributon al siaj enlandaj fandejposedantoj[3] kaj fabrikistoj, dum ili povas akiri la saman aŭ eĉ pli bonan artiklon por duona prezo de ĉi tie? Kaj nun sekvis ekzemploj, kiel freneze alte la usonanoj impostas sin mem, por riĉigi kelkajn monavidajn posedantojn de uzinoj. „Nu”, diris mi, „la afero ŝajnas havi ankaŭ alian aspekton. Vi scias, ke pri karbo, akvoforto, feraj kaj aliaj ercoj, malmultekostaj nutraĵoj, enlanda kotono kaj aliaj krudmaterialoj Usono posedas rimedojn kaj avantaĝojn multege pli grandajn ol tiuj de iu ajn alia eŭropa lando; kaj ke tiuj rimedoj komplete disvolveblas nur se Usono fariĝas industrilando. Vi koncedos krome, ke nuntempe granda popolo kiel la usonanoj ne povas eterne resti nur terkultura; kaj ke tio estus kondamno al eterna barbareco kaj subordiĝo; nuntempe neniu granda popolo povas pluekzisti sen propra industrio. Nu bone. Se Usono devas fariĝi industrilando, kaj se ĝi havas bonan perspektivon por ne nur atingi siajn konkurantojn, sed eĉ venki ilin, tiam ĝi havas du opciojn: aŭ kun libera komerco dum eble kvindek jaroj fari ekstreme multekostan konkurencbatalon kontraŭ la angla industrio, kiu havas antaŭ si centjaran antaŭecon,; aŭ per protektaj doganaĵoj por eble dudek-kvin jaroj ekskludi la anglan konkurencon kun

3 Originale: Gießereibesitzer, uzinposedantoj. -vl

la preskaŭ absoluta certeco ke fine de la dudek-kvin jaroj la usona industrio povas teni sian lokon en la mondmerkato. Kiu el la du vojoj estas la plej malmultekosta kaj plej mallonga? Temas pri tio. Se vi vojaĝas de Glasgovo al Londono, vi povas preni la laŭleĝan malrapidan trajnon (*parliamentary train*); vi pagas unu *penny* po mejlo kaj veturas dek-du mejlojn hore; sed pri tio vi ne kapricas, por tio via tempo estas al vi tro kara. Vi vojaĝas per rapida trajno, pagas du pencojn po mejlo[4] kaj veturas kvardek mejlojn hore. Nu bone, la usonanoj preferas preni rapidbileton, por tiel antaŭeniri pli rapide." Mia skota liberkomercisto[5] havis nenian vorton por respondi.

Ĉar la protektsistemo estas arta rimedo por fabriki fabrikistojn, ĝi povas esti utila ne nur al duonevoluinta kapitalista klaso, kiu baraktas ankoraŭ kun la feŭdismo. Ĝi povas ankaŭ helpi antaŭen al kapitalista klaso en lando kiu, kiel Usono, neniam konis la feŭdismon, sed kiu staras sur evoluŝtupo kie la transiro de terkulturado al industrio fariĝas neceso. Usono, kiu ektroviĝis en tiu situacio, decidiĝis por la protekta doganaĵo. Ekde tiu decido, la dudek-kvin jaroj, pri kiuj mi parolis al mia kunvojaĝanto, preskaŭ jam pasis kaj se mi ne eraras, la protekt-doganaĵo en Usono certe jam sufiĉe faris sian laboron kaj pro tio estas certe malhavebla.

Tio estas ankaŭ mia opinio jam de kelka tempo. Antaŭ du jaroj mi diris al usona protekt-doganisto[6]: „Se Usono enkon-

4 Intenca malobeo de la regulo, ĉi tie kaj en la sekvo, sekvante jam vastan kaj multe pli praktikan uzadon. -vl

5 'Liberkomercisto', ĉi tie kaj en la sekvo, en la senco de defendanto de la liberkomerca sistemo, sekvante la aŭtoron. -vl

6 'Protekt-doganisto' , ĉi tie kaj en la sekvo, en la senco de defendanto de la protektdogana sistemo. -vl

dukas liberkomercon, tiam mi estas konvinkita ke en dek jaroj ĝi venkos Anglujon en la mondmerkato.”

La protekta doganaĵo estas en la plej bona kazo senfina ŝraŭbo kaj oni scias neniam kiam oni povas ĉesigi ĝin. Se ni protektas komercan branĉon, tiam ni rekte aŭ malrekte malutilas al ĉiuj aliaj kaj pro tio devas protekti ankaŭ tiujn. Sed per tio ni malutilas al la unue protektata industrio kaj donas al ĝi pretendon je kompenso; sed tiu kompenso siavice retroefikas sur ĉiuj aliaj komercaj branĉoj kaj rajtigas ili je novaj pretendoj - kaj tiel plu ĝis la senfino. Tiurilate Usono donas al ni frapan ekzemplon, kiel oni povas mortigi gravan industrion per doganprotekto. 1856 la ĉioma tramara importo kaj eksporto de Usono sumiĝis je 641.604.850 dolaroj; de tiu sumo, 75,2 elcento estis transportitaj en usonaj kaj nur 24,8 elcento en eksterlandaj ŝipoj. Jam tiam anglaj oceanaj vaporŝipoj komencis anstataŭi usonajn velŝipojn; malgraŭ tio, usonaj ŝipoj transportis el 762.288.550 dolaroj de ĉioma tramara komerco daŭre 66,5 elcento. Venis la interna milito kaj en sia sekvo doganprotekto por la usona ŝipkonstruado; kaj tiu doganprotekto estis tiom sukcesa ke ĝi preskaŭ tute forpelis la usonan flagon el la oceano. 1887 la ĉioma tramara komerco de Usono estis kreskinta al 1.408.502.979 dolaroj; sed jam nur 13,8 elcento estis transportitaj per usonaj ŝipoj kaj 86,2 elcento per fremdaj ŝipoj. La varvaloro transportita en usonaj ŝipoj sumiĝis 1856 je 482.268.274 dolaroj; 1860 je 507.247.757 dolaroj; 1887 jam nur 194.356.746 dolaroj.[7] Antaŭ kvardek jaroj la usona flago minacis superi la anglan sur la oceano; sed nun ĝi preskaŭ tute malaperis. La doganprotekto por la ŝipkonstruado ruinigis ŝipvetura-

7 Annual Report of the Secretary of the Treasury etc. For the year 1887. XXIX.

don kaj ŝipkonstruadon.

Alia punkto. Plibonigitaj produktadmetodoj sin sekvas nuntempe tiom rapide kaj ŝanĝas la naturon de tutaj industribranĉoj tiom subite kaj tiom komplete, ke tio, kio hieraŭ estis ankoraŭ ĝuste kompensanta protekttarifo, hodiaŭ fariĝis la malo. Por tio la sama raporto de la trezora sekretario sur p. XIX donas al ni ankaŭ ekzemplon:

*„Plibonigoj de la lankomb-maŝinoj en la lastaj jaroj en la tielnomataj kombfadenaj tukoj kaŭzis tiajn ŝanĝojn, ke tiuj tukoj malaperigis la ordinaran lanan strekfadentukon en la vira vestaĵo. Tiu ŝanĝo* (...) *tre malfavore trafis niajn enlandajn kombfadenteksejojn, ĉar la doganaĵo por ĉiuj specoj de krudlano estas la sama, dum la doganaĵo por strekfadenaj tukoj ĝis la valoro de 80 cendoj po pundo estas 35 cendoj po pundo kaj 35 elcento de la valoro; aliflanke la doganaĵo por kombfadena tuko, ĝis la valoro de 80 cendoj po pundo estas nur de 10 ĝis 24 centoj po pundo kaj 35 cendoj de la valoro. En kelkaj okazoj la doganaĵo por la lano uzata por kombfadena tuko estas pli alta ol la finita varo.”*

Do, kio hieraŭ estis protekto de la enlanda industrio, tio hodiaŭ transformiĝis en premion por la fremda importanto, kaj la trezorsekretario [Charles Fairchild] povas ja diri:

*„Estas kaŭzo por atendi ke la enlanda kombfadena teksado devas baldaŭ ĉesi, se ne okazas ŝanĝo en la tarifo.”*

Sed por ŝanĝi la tarifon, oni devas kvereli kun la strekfadenteksistoj, kiuj profitas la nunan situacion, oni devas fari veran kampanjon, por aliopiniigi la plimulton de ambaŭ kongres-domoj, kaj fine la publikan opinion de la lando, kaj la demando

estas: ĉu tio valoras?

Sed la plej granda malagrablaĵo ĉe la protektdoganaĵo estas, ke oni ne facile seniĝas de ĝi. Kiom ajn malfacilas la starigo de protekttarifo justa por ĉiuj flankoj, la reveno al liberkomerco estas ankoraŭ senfine pli malfacila. La kondiĉoj neniam revenos kiuj ebligis al Anglujo fari la transiron ene de kelkaj jaroj. Kaj eĉ tie la batalo datas de 1823 (Huskisson), havis la unuajn sukcesojn 1842 (tarifo de Peels) kaj daŭris ankoraŭ kelkajn jarojn post nuligo de la grenleĝoj. Tiel oni konsentis al la silkindustrio (la sola kiu devis ankoraŭ timi fremdan konkurencon) unue daŭrigitan doganprotekton por pluraj jaroj kaj poste en alia, vere fia formo: la aliaj teksaĵindustrioj estis metitaj sub la fabrikleĝon, kiu limigis la laborhorojn por virinoj, junaj laboristoj kaj infanoj; la silkindustrio estis favorigita per konsiderindaj esceptoj, rajtis dungi pli junajn infanojn kaj rajtis laborigi infanojn kaj junlaboristojn pli longan tempon ol la ceteraj industrioj. La monopolo, kiun la hipokritaj liberkomercistoj nuligis favore al la eksteraj konkurantoj, estis restarigita surkoste de la sano kaj vivo de anglaj laboristinfanoj.

Sed neniam ree okazos, ke lando povas fari la transiron de doganprotekto al liberkomerco en tempo dum kiu ĉiuj aŭ preskaŭ ĉiuj branĉoj de ĝia industrio kapablas alfronti la fremdan konkurencon en malfermita merkato. La neceso de tiu transiro montriĝos longe antaŭ ol tia situacio eĉ nur espereblas. Ĝi montriĝos en diversaj komercaj branĉoj je diversaj tempoj; el la konliktantaj interesoj de tiuj komercaj branĉoj elkreskos la plej edifaj disputoj kaj parlamentaj intrigoj. La maŝinkonstruisto, la inĝeniero kaj la ŝipkonstruisto trovos eble, ke la doganprotekto pri kruda fero plikostigas lian varon kaj per tio, kaj

nur per tio, malebligas al li la eksportadon; la kotonteksisto eble kapablus venki la anglan *kaliko* en la ĉina kaj hinda merkato, se la doganprotekto por la ŝpinisto ne altigus al li la prezon de lia fadeno ktp. En la momento dum kiu nacia industribranĉo komplete konkeris la internan merkaton, en tiu momento la eksportado fariĝas por li nepra. Sub la kapitalisma reĝimo, industrio devas aŭ etendiĝi aŭ ŝrumpi. Ĝi ne povas resti laŭstata; halto de etendiĝo estas komencanta ruino; la progreso de la meĥanikaj kaj ĥemiaj inventoj konstante senokupigas homan laboron, dum ĝi samtempe ankoraŭ pli rapide pliigas kaj koncentras la kapitalon; ĝi tiel kreas en ĉiu stagnanta industrio superfluon de laboristoj, kiuj nenie trovas dungon, ĉar la sama procezo okazas en ĉiuj aliaj industribranĉoj. Tiel la transiro de enlanda al eksporta komerco fariĝas vivnepra[8] demando por ĉiuj ĉi industribranĉoj; sed tie kontraŭstaras al ili la bone akiritaj rajtoj, la enradikiĝintaj interesoj de aliuloj, kiuj provizore trovas pli da sekureco aŭ da profito ĉe doganprotekto ol ĉe liberkomerco. Tiel okazas longa, obstina batalo inter liberkomercistoj kaj protektdoganistoj, batalo, en kiu ĉe ambaŭ flankoj la gvidanteco baldaŭ transiras el la manoj de la rekte interesatoj en tiujn de la profesiaj politikistoj, la ĉefroluloj de la tradiciaj politikaj partioj, kies intereso estas ne ke la demandu estu solvita, sed ke ĝi kiom eble plej longe restu malfermita; post senfina perdo de tempo, forto kaj mono poste sekvas kutime vico da kompromisoj favora jen al tiu, jen al la alia flanko, kiu en sia tutaĵo malrapide drivas al la liberkomerco - escepte se la doganprotekto intertempe sukcesas fariĝi al la nacio absolute netolerebla, kaj tio estas en Usono sufiĉe ebla.

El ĉiuj specoj de doganprotekto la plej malbona estas tiu ki-

8 'Vivnepra' en la senco de nepra por la vivo. -vl

un oni prezentas al ni en *Germanio*. Ankaŭ Germanio spertis baldaŭ post 1815 la neceson de pli rapida industria evoluo. La unua kondiĉo por tio estis starigo de enlanda merkato per forigo de la sennombraj doganlinioj kaj apartaj impostleĝoj de la ŝtatetoj, mallonge, la starigo de la germana doganunuiĝo. Tiu estis starigebla nur surbaze de liberala tarifo, konceptita pli por impostaj celoj ol por industriprotekto. Sub neniu alia kondiĉo oni povintus enirigi la ŝtatetojn. Tiel la nova doganunuiĝa tarifo, kvankam ĝi protektis nur en malgranda mezuro kelkajn industriojn, por la tempo de ĝia enkonduko, estis vera modelo de liberkomerco; ĝi restis tia, kvankam ekde 1830 la plej multaj germanaj fabrikistoj ekpostulis doganprotekton. Kaj tamen, sub tiu ekstreme liberala tarifo kaj spite al la senkompata subpremo de germanaj hejmindustrioj bazitaj sur manlaboro fare de la konkurenco de la granda angla industrio, okazis la transiro de manlaboro al maŝinaro ankaŭ en Germanio iom post iom kaj estas nun preskaŭ plenumita. La transiro de Germanio de terkulturado al industrio okazis en la sama mezuro kaj estis ekde 1866 eĉ helpata de politikaj eventoj: la starigo de forta centra registaro kaj de imperia parlamento, kiuj certigas unuecan komercan leĝdonadon; unueca mono, mezuro kaj pezo, kaj fine la franca alfluo de miliardoj[9]. - Tiel okazis, ke proksimume 1874 la germana ĉiomkomerco en la mondmerkato postrestis jam nur malantaŭ la angla[10], kaj Germanio aplikis pli da vaporforto en industrio kaj transporto ol iu ajn alia eŭropa kontinenta lando.

9 Aludo al la pago de Francio al la Germana Imperio de granda sumo en oro trudita al Francio pro la milito de 1870-1871, kiun ĝi faris kaj perdis kontraŭ Prusio. -vl

10 Ĉiomkomerco (importo kaj eksporto sumitaj) 1874 en milionoj da markoj: Britio 13.380; Germanio 9.300; Francio 6.600; Usono 4.980. (Kolb, „Statistik”, 7-a eld. Lepsiko 1875, p. 790.)

Tiel pruviĝis, ke eĉ ankoraŭ nuntempe, spite al la enorma antaŭeco de la angla industrio, granda lando povas ellabori sukcesan konkurencon kun Anglujo en malfermita merkato.

Jen subite ŝanĝiĝis la fronto: Ĝuste en tiu momento, en kiu pli ol iam ajn la liberkomerco ŝajnis esti neceso por Germanio, ĝuste tiam ĝi enkondukis protektdoganaĵojn. Tio estis sendube absurda, sed ĝi klarigeblas.

Tiom longe, kiom Germanio eksportis grenon, ĉiuj terposedantoj kaj ĉiuj ŝipkompanioj estis entuziasmaj liberkomercistoj. Sed 1874, anstataŭ eksporti grenon, Germanio bezonis fortajn importojn el eksterlando. Proksimume samtempe Usono komencis inundi Eŭropon per eksportoj de malmultekosta greno; ĉie, kien ili fluis, ili malaltigis la monenspezon kiun liveris la grundo, kaj per tio la grundrenton; ekde tiam la tuta terposedantaro en tuta Eŭropo alvokis doganprotekton. Samtempe la germana industrio suferis la postsekvojn de la sensava superproduktado kaj superspekulado, kiuj elkreskegis sub la franca miliardopluvo; dum Anglujo, kies industrio ekde la krizo de 1866 daŭre ne superis kronikan ŝtopiĝon, inundis ĉiujn alireblajn merkatojn per varoj hejme ne vendeblaj kaj pro tio ekstere fordonacataj je forvendaj prezoj. Kvankam ankaŭ la germana industrio dependis esence de eksporto, la fabrikistoj vidis tamen nun en doganprotekto rimedon certigi al si la internan merkaton. La registaro siavice estis feliĉega povi uzi tiun cirkonstancon favore al la terposedanta nobelaro, donante al ambaŭ, terposedantoj kaj industriistoj, protektdoganaĵojn. 1878 oni enkondukis tian protekttarifon, same por terkulturaj kiel por industriaj produktoj.

La sekvo estis, ke de tiam la eksportado de germanaj indust-

riproduktoj estas pagata ĝustadire el la poŝo de la hejmaj konsumantoj. Kie ajn eble, la fabrikistoj estigis kartelojn por regulado de la eksportkomerco kaj de la produktado mem. La germana ferproduktado estas en la manoj de kelkaj malmultaj firmaoj, plej ofte akcisocietoj, kiuj kune produktas proksimume kvaroble pli da fero ol la lando mezume bezonas. Por eviti senutilan konkurencon inter si, tiuj firmaoj kreis kartelon kiu disdonas ĉiujn eksterlandajn projektojn[11] inter ili kaj kiu en ĉiu kazo determinas la firmaon kiu devas fari la realan oferton. Tiu kartelo faris antaŭ kelkaj jaroj eĉ interkonsenton kun la anglaj uzinposedantoj, kiu intertempe tamen rompiĝis. Same la vestfaliaj karbminejoj, kiuj produktas proksimume tridek milionojn da tunoj jare, starigis kartelon por regulado de la prezoj de la ofertoj[12] kaj eĉ de la produktoj[13] . Ĝenerale, ĉiu germana fabrikisto diras al vi, ke la sola celo de la protektdoganoj estas, permesi al li revigliĝi en la interna merkato post la forvendoprezoj kiujn li devas suferi eksterlande. Sed tio estas ankoraŭ ne ĉio. Je la prezo de tiu absurda sistemo de industriprotekto la industriaj kapitalistoj konsentis ankoraŭ pli absurdan monopolon, kiun ricevis la grundposedo. Ne nur submetiĝis ĉiuj terkulturaj produktoj al altaj kaj ankoraŭ daŭre altigataj enirdoganaĵoj, sed certaj kamparaj industrioj kiujn la sinjoroj junkroj tenas en siaj bienoj, estas rekte subtenataj el la publika monujo. La betsukera industrio estas ne nur protektata, sed ĝi ricevas krome enormajn sumojn en formo de eksportpremioj. Iu, kiu devus scii tion, opinias ke, se la eksportata sukero estus ĉiom ŝutita en la maron, la fabrikisto farus tamen bonan komercon pro la eks-

11 En la germana originalo: Submissionen. -vl
12 En la germana originalo: Submissionsofferten. -vl
13 En la germana originalo: und der Produktion selbst. -vl

portpremio. Same la distilistoj de terpoma alkoholo ricevas, sekve de la nova leĝaro, el la poŝo de la publiko donacon de almenaŭ tridek-ses milionoj da markoj jare. Kaj ĉar preskaŭ ĉiu granda grundposedanto en nordorienta Germanio estas aŭ betsuker-fabrikisto aŭ terpomalkohol-distilisto aŭ ambaŭ, ne mirigas ke la mondo estas vere inundata de iliaj produktoj.

Tiu politiko, ĉiukaze pereiga, estas duoble tia en lando, kies industrio konservas siajn vendojn en neŭtralaj merkatoj ĉefe per la malkareco de la laboro. La salajro en Germanio estas eĉ en la plej bonaj tempoj tenata maldece proksima al la malsatpunkto per la rapida kresko de la popolnombro spite al la elmigrado. Sed la salajro devas kreski sekve al la kariĝo de ĉiuj vivrimedoj kiun trudas la protektdogano. La germana fabrikisto tiam ne plu kapablos, kiel nun tro ofte, kompensi la forvendoprezojn de siaj varoj per depreno de la normala salajro de siaj laboristoj: li perdas la konkurencivon. En Germanio la protektdogano buĉas la kokinon kiu metas al ĝi orajn ovojn.

Ankaŭ *Francio* suferas la sekvojn de la doganprotekto. Tie la sistemo pro ducentjara senkontesta regado fariĝis preskaŭ parto de la nacia vivo. Tamen ĝi fariĝas pli kaj pli obstaklo. La granda industrio necesigas konstantan ŝanĝadon en la metodoj de produktado, sed la protektdogano baras la vojon. La dorso de silkveluro estas hodiaŭ farata el fajna kotonfadeno; la franca fabrikisto devas por tio aŭ pagi la doganprotekton aŭ submeti sin al senfinaj burokrataj oficaj ĉikanoj, kiuj pli ol sufiĉe kompensas la per ili akiritan *admission temporaire* [portempa allaso], kaj tiel Krefeldo[14] povas sukcese konkuri, ĉar tie la doganprotekto por fajna kotonfadeno estas daŭre malpli alta. La fran-

14 Germana urbo kun i.a. teksadindustrio. -vl

ca eksporto, kiel jam dirite, konsistas precipe el luksaj artikloj, en kiuj decidas la ĝis nun supera franca gusto; sed la ĉefaj konsumantoj de tiaj artikloj estas nuntempe ĉie niaj modernaj kapitalistaj novriĉuloj, kiuj havas nek klerecon nek guston, kiuj estas same bone servitaj per malmultekostaj kaj malgraciaj germanaj aŭ anglaj imitaĵoj kaj kiuj sufiĉe ofte aĉetas tiaĵon je frenezaj prezoj kiel veran francan artiklon. La merkato por la specialaj artikloj kiuj ne fareblas ekster Francio pli kaj pli striktiĝas; la franca industrieksporto tenas sin nur apenaŭ kaj certe baldaŭ malpliiĝas; kiajn novajn artiklojn Francio povas eksporti por kompensi tiujn kies eksporto formortas? Se tie io povas helpi, tiam tio estas aŭdaca paŝo en direkto al liberkomerco, kiu metas la francan fabrikiston el sia kutima forcej-atmosfero en la liberan aeron de la malfermita konkurenco. Efektive la franca ĉiomkomerco estus jam nun ŝrumpinta, se la malforta kaj malcerta paŝo al liberkomerco, la Cobden-traktato de 1860, ne helpintus ĝin; ties efikoj estas nun sufiĉe elĉerpitaj, kaj pli forta dozo de tia toniko estas rekomendata.

Apenaŭ valoras la penon paroli pri *Ruslando*. Tie la protekttarifo, kies doganaĵoj pagendas en oro anstataŭ en la devaluita papermono de la lando, servas antaŭ ĉio por tio, liveri al la malriĉiĝinta registaro la sonantan moneron, kiun ĝi bedaŭrinde ne povas malhavi en rilato kun eksterlandaj kreditoroj. En la tago kiam tiu tarifo plenumas sian protektotaskon kaj senescepte ekskludas fremdajn varojn, en tiu tago la rusa registaro estas bankrota. Malgraŭ tio tiu sama registaro antaŭ la okuloj de siaj kredemaj subuloj dancigas la brilan esperon kvazaŭ tiu tarifo transformus Ruslandon en ekonomie komplete sendependan landon, kiu bezonas el eksterlando nenion, vere nenion, nek nutraĵojn nek krudmaterialojn nek produktojn de industrio

aŭ de arto. La homoj kiuj kredas je tiu fantoma Ruslando fermita kontraŭ la tuta cetera mondo, staras sur la ŝtupo de tiu prusa gvardia leŭtenanto, kiu postulis en vendejo globon, ne terglobon aŭ ĉielglobon, sed globon de Prusio.

Sed reen al Usono. Ekzistas jam sufiĉe da signoj, ke la doganprotekto plenumis por Usono kion ĝi povis plenumi, kaj ke estas tempo por adiaŭi ĝin. Unu el tiuj signoj estas la starigo de karteloj por subteno de la protektataj industrioj en la ekspluatado de sia monopolo. Nu, karteloj (ringoj, trustoj) estas aŭtente usonaj institucioj, kaj kie ili ekspluatas naturajn avantaĝojn, tie oni devas provizore toleri ilin. La transformado de la pensilvania petrolpruduktado en monopolon de la Standard Oil Company estas metodo, kiu tute kongruas kun la reguloj de la kapitalisma produktado. Sed se la sukerfabrikantoj volas transformi la protekton, kiun la nacio donis al ili kontraŭ eksterlanda konkurenco, en monopolon kontraŭ la enlandaj konsumantoj, tio signifas, kontraŭ la sama nacio kiu donis al ili la protekton, tiam temas pri alia afero. Tamen la grandaj sukerfabrikantoj faris kartelon kiu alstrebas nenion alian. Kaj la sukerkartelo ne estas la sola en sia speco. La starigo de tiaj karteloj en protektataj industrioj estas la plej sekura signo ke la doganprotekto plenumis sian vivon kaj ŝanĝas sian karakteron; ke ĝi protektas la fabrikiston jam ne kontraŭ la fremdan importiston, sed kontraŭ la enlandan konsumanton, ke ĝi produktis almenaŭ en tiu speciala industribranĉo sufiĉajn fabrikistojn, se ne tro da ili; ke la mono ĵetita en la monujon de tiuj fabrikistoj estas simple forĵetita mono - same kiel en Germanio.

En Usono kiel aliloke oni defendas la doganprotekton per la aserto ke la liberkomerco profitigas nur Anglujon. La plej bona

pruvo de la malo estas, ke en Anglujo ne nur la farmistoj kaj terposedantoj, sed eĉ la fabrikistoj fariĝas protektdoganistoj. En la sidejo de la liberkomerca Manĉestro-lernejo, en Manĉestro mem, la 1-an de novembro 1886 la komerca ĉambro diskutis pri la propono,

*„ke, post kiam ni vane atendis kvardek jarojn instigi aliajn naciojn imiti la de Anglujo donitan liberkomercan ekzemplon, la ĉambro kredas ke la tempo venis denove prikonsideri tiun situacion."*

Tiu propono estis ja rifuzita, sed per 22 voĉoj kontraŭ 21. Kaj tio okazis en la centro de la kotonindustrio, la sola angla industrio kies supereco en la malfermita merkato ŝajnas ankoraŭ nekontestata. Sed kompreneble, ankaŭ en tiu speciala industribranĉo la inventospirito elmigris el Anglujo al Usono. La plej novaj plibonigoj en la kotonmaŝinaro (ŝpinado kaj teksado) venis preskaŭ ĉiuj el Usono, kaj Manĉestro bezonis nur enkonduki ilin. En ĉiaj industriaj inventoj Usono staras senkonteste ĉe la pinto, dum Germanio defias la duan rangon al la angloj. La konscio gajnas terenon en Anglujo ke la angla industrimonopolo estas definitive for, ke Anglujo kompare perdas ĉiam pli da tereno dum ĝiaj konkurantoj avancas kaj ke ĝi iom post iom drivas al situacio, en kiu ĝi devos esti industriŝtato inter multaj aliaj, anstataŭ, kiel iam revite, la „metiejo de la mondo". Kaj por bari tiun enrompiĝantan sorton, nun la doganprotekto, malbone kaŝita sub la vualo de la „Fair Trade" kaj de la bataldoganaĵoj, estas alvokata de la filoj de la samaj homoj kiuj antaŭ kvardek jaroj vidis nenian savon ol en la absoluta liberkomerco. Kaj se la anglaj fabrikistoj nun mem trovas ke la liberkomerco ruinigas ilin, kaj alpaŝas la registaron

por ke tiu protektu ilin kontraŭ fremda konkurenco, tiam venis nepre la momento forĵeti la de nun senutilan protektsistemon kaj kontraŭbatali la sinkantan industrimonopolon de Anglujo per ties propra armilo, la liberkomerco.

Tamen, kiel jam dirite, oni facile enkondukas la doganprotekton, sed oni ne facile seniĝas je ĝi. Per tio, ke la leĝdonado akceptis la doganprotekton, ĝi kreis potencajn interesojn kaj igis sin respondecaj por ili. Ne ĉiu el tiuj unuopaj interesoj, ne ĉiu industribranĉo estas same preparita vidi sin en donita momento elmetita al la libera konkurenco. Dum kelkaj jam ne bezonas protektan prizorgadon, aliaj pene posttreniĝas. Tiu diferenco de la situacio ekmovos en la parlamento la kutiman parti-koterion kaj estas per si mem jam sufiĉa certeco ke, kiam la liberkomerco mem estas decidita, oni pritraktas la protektitajn industriojn tre delikate, kiel post 1846 la silkindustrion en Anglujo. Kiel la afero statas, tio estas neevitebla kaj la liberkomercistoj devos toleri tion, kondiĉe ke la transiro certas almenaŭ en la principo.

La demando pri liberkomerco kaj doganprotekto moviĝas komplete ene de la limoj de la nuntempa sistemo de la kapitalisma produktado kaj pro tio ne havas rektan intereson por socialistoj, kiu postulas la forigon de tiu sistemo. Ĝi tamen interesas ilin en tio, ke ili devas deziri al la nuna produktadsistemo kiom eble plej liberan disvolviĝon kaj kiom eble plej rapidan etendiĝon; ĉar per tio ĝi disvolvos ankaŭ siajn neprajn ekonomiajn sekvojn: mizeron de la granda popolamaso sekve de superproduktado kiu produktas aŭ periodajn krizojn aŭ kronikan stagnadon de la trafiko; fendon de la socio en malgrandan klason de grandaj kapitalistoj kaj grandan klason de fakte heredaj sal-

ajrosklavoj, proletoj, kies nombro konstante kreskas, dum ĝi estas same konstante superfluigata per nova laborŝpara maŝinaro; mallonge kuradon de la socio en sakstraton el kiu ne eblas eskapi, escepte per kompleta transformado de la ekonomia strukturo sur kiu baziĝas la socio. El tiu vidpunkto Markso deklaris sin antaŭ kvardek jaroj por la liberkomerco kiel por la pli rekta vojo, do tiu, kiu plej rapide kondukos la socion en tiun sakstraton. Sed se Markso pro tiu kialo estas por la liberkomerco, ĉu tio ne estas, por ĉiu defendanto de la nuna ordo, kialo por esti kontraŭ la liberkomerco? Se la liberkomerco estas konsiderata revolucia, ĉu tiam ne ĉiuj bonaj burĝoj devas voĉdoni por la doganprotekto, kiu tiam estas nepre konservativa?

Se nuntempe lando akceptas la liberkomercon, ĝi faras tion certe ne por komplezi la socialistojn, sed ĉar la liberkomerco fariĝis neceso por la industriaj kapitalistoj. Sed se ĝi rifuzas la liberkomercon kaj konservas la doganprotekton, por trompi la socialistojn je ilia atendita socia katastrofo, tiam neniu estas pli trompita ol ĝi mem. La protektdoganaĵo estas rimedo por arte fabriki fabrikistojn kaj pro tio ankaŭ rimedo por arte fabriki dunglaboristojn. Se vi bredas la unuajn, vi kunbredas la aliajn. La dunglaboristo sekvas ĉie la spurojn de la fabrikisto; estas kvazaŭ la nigra zorgo de Horacio, kiu sidas malantaŭ la rajdanto kaj kiun tiu ne povas deskui. Estas tiel, ke la sorton, per aliaj vortoj, la neprajn sekvojn de viaj propraj agadoj vi tute ne povas eskapi. Produktadsistemo, bazita sur ekspluatado de dunglaboro, sistemo, en kiu la riĉaĵo kreskas proporcie al la nombro de la aplikataj kaj ekspluatataj laboristoj, tia sistemo ne povas persisti sen pliigi la klason de la dunglaboristoj kaj per tio kreskigi klasan kontraŭdiron, per kiu iun tagon la tuta

sistemo devas perei. Ja ne eblas ŝanĝi tion:[15] Vi ne povas alie ol pludisvolvi la kapitalisman sistemon, plirapidigi akumuladon kaj centriĝon de la kapitalo kaj samtempe per tio la produktadon de laborista klaso kiu staras ekster la oficiala socio. Ĉu vi elektas la protektdoganan aŭ la liberkomercan vojon, tio neniom ŝanĝas la rezulton kaj apenaŭ iom de la tempo kiu restas al vi ĝis kiam aperas la rezulto. Ĉar jam longe antaŭe la doganprotekto fariĝis neeltenebla kateno por ĉiu lando kiu kun perspektivo de sukceso alstrebas sendependan pozicion en la mondmerkato.

15 En la germana originalo: Es ist nun einmal nicht zu ändern - proksimume: „Ja ne eblas ŝanĝi tion”, popola diro kun la preciza signifo de la moderna „Ne estas alternativo”. -vl

# Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco

[Esperantigita el la franca originalo, laŭ la reta publikigaĵo (www.marxists.org/francais/marx/works/1848/01/km18480107.htm), kun konsulto de la germana eldono, Karl Marx - Friedrich Engels: Werke, Band 4, p. 444 - 458, Dietz-Verlag, Berlino (GDR) 1972]

Sinjoroj,

La nuligo de la grenleĝoj[16] en Anglujo estas la plej granda triumfo kiun la liberkomerco atingis en la 19-a jarcento. En ĉiuj landoj kie la fabrikistoj parolas pri liberkomerco, ili celas ĉefe la liberkomercon de grenoj kaj de krudmaterialoj ĝenerale. Frapi per protektaj impostoj la eksterlandajn grenojn, tio estas fia, tio estas spekuli per la malsato de la popoloj.

Malmultekosta pano, pli altaj salajroj, *cheap food, high wages*, jen la sola celo por kiu la *free-traders*, en Anglujo, elspezis milionojn, kaj ilia entuziasmo etendiĝis al siaj fratoj de la kontinento. Ĝenerale, se oni volas la liberkomercon, tio estas por mildigi la kondiĉon de la laboranta klaso.

Sed, strange! la popolo, al kiu oni volas nepre provizi malmultekostan panon, estas tre sendanka. La malmultekosta pano estas tiom fifama en Anglujo kiom la malmultekosta registaro en Francio. La popolo vidas en la sindediĉaj homoj, en iu Bowring, iu Bright kaj samspeculoj, siajn plej grandajn malamikojn

16 Ĉi tie, kiel en la sekvo de la teksto, Markso signas per „la grenleĝoj” la „leĝojn pri la grenoj”. [Noto de la franclingva eldono]

kaj la plej senhontajn hipokritulojn.

Ĉiuj scias ke la batalo inter liberaluloj kaj demokratoj nomiĝas, en Anglujo, la batalo inter free-traders kaj ĉartistoj.

Ni vidu nun kiel la anglaj *free-traders* pruvis al la popolo la bonajn sentojn kiuj igis ilin agi.

Jen kion ili diris al la laboristoj de la fabrikoj:

La doganaĵo prenata por la grenoj estas imposto por la salajro, tiun imposton vi pagas al la terposedaj sinjoroj, al tiuj mezepokaj nobeloj; se via pozicio estas mizera, tio estas pro la kareco de la plej bezonataj vivrimedoj.

La laboristoj demandis siavice la fabrikistojn:

Kiel okazas ke, ekde la lastaj tridek jaroj dum kiuj nia industrio spertis la plej grandan evoluon, nia salajro malaltiĝis en multe pli rapida proporcio ol altiĝis la prezo de la grenoj?

La imposto kiun ni pagas al la terproprietuloj, kiel vi asertas, faras por la laboristo proksimume tri pencojn (ses *sous*) semajne. Kaj tamen la salajro de la manteksisto malaltiĝis de 28 ŝ. semajne al 5 ŝ.  (de 35 fr. al 7 fr. 25) de 1815 ĝis 1843; kaj la salajro de la teksisto, en la aŭtomata laborejo, estis reduktita de 20 ŝ. semajne al 8 ŝ. (de 15 fr. al 10 fr.) de 1823 ĝis 1843.

Kaj dum ĉi tuta tempo la parto de la imposto kiun ni pagis estis neniam pli ol tri pencoj. Kaj poste! En 1834, kiam la pano estis tre malmultekosta kaj la aferoj iris tre bone, kion vi diris? Se vi estas malfeliĉaj, tio estas ĉar vi faras tro da infanoj, kaj ĉar via geedzeco estas pli fruktodona ol via metio!

Jen viaj propraj paroloj kiujn vi tiam diris; kaj vi iris fari la

novajn leĝojn pri malriĉuloj kaj konstrui la *work-houses*, tiujn malliberejojn[17] de la proletoj.

Al tio rebatis la fabrikistoj:

Vi pravas, sinjoroj laboristoj, estas ne nur la prezo de greno, sed ankaŭ la konkurenco inter la ofertataj manoj, kiu determinas la salajron.

Sed pensu bone pri unu afero: ke nia grundo konsistas nur el rokoj kaj sablo. Ĉu vi eble imagas ke oni povas kreskigi grenon en florpotoj? Tiel, se, anstataŭ malŝpari nian kapitalon kaj nian laboron en tute sterila grundo, ni forlasus la terkulturadon por dediĉi nin ekskluzive al la industrio, la tuta Eŭropo forlasus la fabrikojn kaj Anglujo fariĝus unu sola granda fabrikurbo, kun la resto de Eŭropo kiel kamparo.

Tiel parolante al siaj propraj laboristoj, la fabrikisto estas interrompita de etkomercisto kiu diras al li:

Sed se ni nuligas la grenleĝojn, ni ruinigos, estas vere, nian terkulturon, sed pro tio ni ne devigus la aliajn landojn provizi sin ĉe niaj fabrikoj kaj forlasi la siajn.

Kio rezultiĝos! Mi perdos la klientojn kiujn mi havas nun en la kamparo, kaj la interna komerco perdos siajn merkatojn.

La fabrikisto, turnante la dorson al la laboristo, respondas al la vendisto:

Pri tio, lasu nin fari. Ekde kiam la imposto pri greno estas nuligita, ni havos el eksterlande pli malmultekostan grenon. Poste ni malaltigos la salajron, kiu altiĝus samtempe en la aliaj landoj el kiuj ni ricevas la grenojn.

17 Originale: ces bastilles des prolétaires.

Tiel ni havos krom la avantaĝojn, kiujn ni jam ĝuas, ankoraŭ tiun de pli malaltaj salajroj, kaj kun ĉiuj ĉi avantaĝoj ni jam devigos la kontinenton aĉeti ĉe ni.

Sed nun enmiksiĝas la farmisto kaj la kamplaboristo en la diskuton.

Kaj ni, do, kio fariĝos ni? diras ili.

Ĉu ni helpu fari mortverdikton por la terkulturado, de kiu ni vivas? Ĉu ni devas toleri ke oni fortiras de ni la grundon el sub niaj piedoj?

Anstataŭ ia respondo la *Anti-corn-law league* kontentiĝis elmeti premiojn por la tri plej bonaj skribaĵoj pri la bonfara influo de la nuligo de la grenleĝoj sur la angla terkulturado.

Tiuj premioj estis gajnitaj de la sinjoroj Hope, Morse kaj Greg, kies libroj estis disvastigitaj en la kamparo je miloj da ekzempleroj.

Unu el la premiitoj insistas pri la pruvo ke nek la farmisto nek la terlaboristo perdus ĉe la libera importado de la eksterlanda greno, sed nur la grundproprietulo.

La angla farmisto, ekkrias li, ne bezonas timi la nuligon de la grenleĝoj, ĉar neniu lando povas produkti same bonan kaj same bonprezan grenon kiel Anglujo. Kaj se tamen la grenprezo falus, tio ne povas malutili al vi, ĉar tiu malaltiĝo tuŝus nur la renton kiu malaltiĝus kaj neniel la kapital-profiton kaj la salajron, kiuj restus senŝanĝaj.

La dua premiito, s-ro Morse, asertas male, ke la grenprezo altiĝos post nuligo de la grenleĝoj. Li donas al si senfinan penon por pruvi ke la protektaj doganaĵoj neniam povas certigi al

la greno profitigan prezon.

Apoge al sia aserto li citas la fakton ke ĉiufoje kiam oni importis eksterlandan grenon, la grenprezo en Anglujo konsiderinde altiĝis kaj ke, kiam oni importis malmulte, ĝi eksterordinare falis. La premiito forgesas ke la importo ne estis la kaŭzo de la alta prezo, sed ke la alta prezo estis la kaŭzo de la importo.

Kaj, tute male al sia kunpremiito, li asertas ke ĉia altiĝo de la grenprezo efikas profite al la farmisto kaj al la laboristo, kaj ne profite al la proprietulo.

La tria premiito, s-ro Greg, kiu estas granda fabrikisto kaj kies libro direktiĝas al la klaso de la grandaj farmistoj, ne povis uzi  similajn naivaĵojn. Lia lingvaĵo estas pli scienca.

Li koncedas ke la grenleĝoj altigas la renton nur per tio ke ili altigas la grenprezon kaj ke ili altigas la grenprezon nur per tio ke ili trudas al la kapitalo la neceson uzi malpli kvalitan grundon, kio klarigeblas tutsimple.

En la mezuro kiel la loĝantaro kreskas, kaj ĉar la eksterlanda greno ne povas eniri en la landon, oni estas ja devigata valorigi malpli fekundajn terenojn, ĉe kiuj la kultivado estas pli kosta kaj kies produkto estas sekve pli kara.

Ĉar la greno estas trude vendata, ĝia prezo reguliĝas nepre laŭ la prezo de la produktoj de la plej kostigaj terenoj. La diferenco inter tiu prezo kaj la produktadkostoj de la plej bonaj terenoj konsistigas la renton.

Se do, sekve al nuligo de la grenleĝoj, la grenprezo kaj, sekve, la rento falos, tio okazos ĉar la malpli bona grundo ne estos

plu kultivata. Tiel la malaltiĝo de la rento sekvigas neeviteble la ruiniĝon de parto de la farmistoj.

Tiuj rimarkoj estis necesaj por kompreni la lingvaĵon de s-ro Greg.

La etfarmistoj, diras li, kiuj ne povos teni sin en la terkulturado, trovos rimedon en la industrio. La grandfarmistoj siavice devas gajni ĉe tio. Aŭ la proprietuloj estas devigataj vendi al ili tre bonpreze siajn terojn aŭ la farmkontraktoj kiujn ili faras kun ili estos je tre longa daŭro. Tio ebligos al ili investi pli grandajn kapitalojn en la grundon, uzi maŝinojn pli grandskale kaj tiel ŝpari manlaboron kiu cetere estos malpli kosta danke al la ĝenerala malaltiĝo de la salajroj, la rekta sekvo de la nuligo de la grenleĝoj.

Doktoro Bowring donis al ĉiuj ĉi argumentoj religian gloron, elkriante en publika mitingo:

*„Jesuo Kristo estas liberkomerco; liberkomerco estas Jesuo Kristo!”*

Oni komprenas, ke la tuta ĉi hipokriteco ne taŭgis por bongustigi al la laboristoj la malmultekostan panon.

Kiel cetere la laboristoj povintus kompreni la subitan homamon de la fabrikistoj, de tiuj samaj uloj kiuj estis ankoraŭ en plena batalo kontraŭ la dekhora leĝo, per kiu oni volis redukti la labortagon de la fabriklaboristo de dek-du al dek horoj!

Por doni al vi ideon pri la homamo de tiuj fabrikistoj, mi memorigas al vi, sinjoroj, pri la fabrikordoj enkondukitaj en ĉiuj fabrikoj.

Ĉiu fabrikisto havas por sia privata uzo veran punleĝaron en

kiu punoj estas fiksitaj por ĉiuj intencaj aŭ neintencaj deliktoj. Ekzemple, la laboristo pagos tiom, se li havas la malbonŝancon sidiĝi sur seĝon, se li flustras, babilas, ridas, se li alvenas kelkajn minutojn tro malfrue, se maŝinpeco rompiĝas, se li ne liveras la produktojn en la postulatan kvaliton ktp ktp. La punoj estas ĉiam pli altaj ol la damaĝo vere kaŭzita de la laboristo. Kaj por doni al la laboristo ĉian facilon altiri punojn al si, oni antaŭigas la fabrikhorloĝon, oni liveras malbonan krudmaterialon por ke la laboristo faru el ĝi bonajn produktojn. Oni eksigas la ĉeflaboriston se li ne estas sufiĉe lerta pliigi la punkazojn.

Vi vidas, sinjoroj, ke tiu hejmleĝaro estas farita por bredi rompojn de la regularo, kaj oni bredas rompojn de la regularo por bredi monon. Tiel la fabrikisto uzas ĉiujn rimedojn por redukti la nominalan salajron kaj por ekspluati eĉ la hazardojn kiujn la laboristo ne regas.

Kaj tiuj fabrikistoj, ili estas la samaj homamantoj, kiuj volas konvinki la laboristojn ke ili estas kapablaj elspezi eksterordinarajn sumojn nur por plibonigi ilian sorton.

Je unu flanko ili plej etanime pritranĉas la salajron de la laboristo per fabrikregularoj, kaj je la alia flanko ili trudas al si la plej grandajn oferojn por realtigi ĝin helpe de la Ligo Kontraŭ la Grenleĝo.

Ili konstruas je grandaj kostoj palacojn en kiuj la Ligo iel konstruis sian oficialan sidejon; ili sendas armeon da misiistoj al ĉiuj anguloj de Anglujo, por ke ili prediku la religion de liberkomerco; ili presigas kaj distribuigas senpage milojn da broŝuroj por klarigi al la laboristo liajn proprajn interesojn, ili elspezas eksterordinarajn sumojn por favorigi la gazetaron al ilia kaŭzo, ili organizas vastan administracion por gvidi la li-

berkomercajn movadojn kaj ili malŝparas la tutan riĉaĵon de sia elokvento en publikaj amaskunvenoj. Dum tia amaskunveno laboristo elkriis:

Se la terproprietuloj vendus niajn ostojn, vi fabrikistoj estus la unuaj kiuj aĉetus ilin, por ĵeti ilin en vapormuelilon kaj faru el ili farunon.

La anglaj laboristoj tre bone komprenis la signifon de la batalo inter terproprietuloj kaj industriaj kapitalistoj. Ili sciis tre bone ke oni volis malaltigi la panprezon por malaltigi la salajron kaj ke la industriprofito altiĝus tiom kiom la rento malaltiĝus.

Ricardo, la apostolo de la anglaj liberkomercistoj, la plej eminenta ekonomikisto de nia jarcento, pri tiu ĉi punkto perfekte konsentas kun la laboristoj.

Li diras en sia fama verko pri politika ekonomio:

> *Se, anstataŭ rikolti grenon ĉe ni, ni malkovrus novan merkaton kie ni povus akiri ĝin pli bonpreze, tiukaze la salajroj devus malaltiĝi kaj la profitoj kreski. La malaltiĝo de la terkulturaj produktoj reduktas la salajrojn ne nur de la laboristoj dungitoj, sed ankaŭ de ĉiuj tiuj kiuj laboras en la industrio aŭ kiuj estas dungitaj en komerco.*

Kaj ne kredu, sinjoroj, ke estas io tute sensignifa por la laboristo, ricevi jam ne pli ol 4 frankojn, ĉar la greno kostas malpli, kiam antaŭe li ricevis 5 frankojn.

Ĉu lia salajro ne falis kompare kun la profito? Kaj ĉu ne estas klare ke lia socia pozicio pli malboniĝas fronte al la kapital-

ismo? Krom tio, li perdas ankoraŭ fakte.

Kiam la grenprezo estis ankoraŭ pli alta, kaj ankaŭ la salajro, eta ŝparo ĉe pankonsumo sufiĉis por ke li povu akiri aliajn ĝuojn, sed ekde kiam la pano kaj sekve la salajro estas malkara, li povas preskaŭ neniom ŝpari je pano por aĉeti aliajn aĵojn.

La anglaj laboristoj sentigis al la liberkomercistoj ke ili ne lasas sin trompi de iliaj trompaĵoj kaj mensogoj, kaj se ili, malgraŭ tio, asociiĝis al ili kontraŭ la terproprietuloj, tiam por detrui la lastajn restojn de la feŭdeco kaj por alfronti jam nur unu malamikon. La laboristoj ne trompiĝis en siaj kalkuloj; ĉar la terposedantoj, por venĝi sin kontraŭ la fabrikistoj, batalis kune kun la laboristoj por adoptigi la leĝon pri dek horoj, kiun tiuj postulis vane dum tridek jaroj, kaj kiu estis decidita tuj post la nuligo de la grenleĝoj.

Kiam, dum la kongreso de la ekonomikistoj, doktoro Bowring tiris el sia poŝo longan liston por montri ĉiujn pecojn da bovaĵo, da ŝinko, da lardo, da kokaĵoj ktp ktp kiuj estis importitaj en Anglujon por esti konsumotaj, kiel li diris, de la laboristoj, li malbonŝance forgesis diri al vi ke en la sama momento la laboristoj de Manĉestro kaj de aliaj fabrikurboj troviĝis ĵetitaj surstraten de la krizo kiu jam komencis.

Principe oni devas en politika ekonomio neniam kunmeti nombrojn de unu sola jaro por dedukti el ili ĝeneralajn leĝojn. Oni devas ĉiam preni la mezumon de ses ĝis sep jaroj - la tempospacon dum kiu la moderna industrio pasas tra la diversaj fazoj de prospero, superproduktado, stagnado, krizo, kaj finas sian neeviteblan cirkluladon.

Sendube, kiam la prezo de ĉiuj varoj falas, kaj tio estas la

nepra sekvo de liberkomerco, mi povas por unu franko akiri multe pli da aĵoj ol antaŭe. Kaj la franko de la laboristo validas same kiel ĉiu alia. Do, la liberkomerco estos tre avantaĝa por la laboristo. Estas nur eta malagrablaĵo ligita kun tio, nome ke la laboristo, antaŭ ol interŝanĝi sian frankon por aliaj varoj, unue interŝanĝis sian laboron kontraŭ la kapitalo. Se ĉe tiu interŝanĝo li ricevus ĉiam por la sama laboro tiun frankon, kaj se la prezo de ĉiuj aliaj varoj falus, li ĉiam gajnus ĉe tio. La malfacilo ne estas pruvi ke se la prezo de ĉia varo falas, mi havas pli da varoj por la sama mono.

La ekonomikistoj prenas ĉiam la prezon de la laboro en la momento en kiu ĝi interŝanĝiĝas kontraŭ aliaj varoj. Sed ili lasas tute flanke la momenton en kiu la laboro faras sian interŝanĝon kontraŭ la kapitalo.

Se malpli da kostoj necesas por movi la maŝinon kiu produktas la varojn, tiam la aĵoj necesaj por bonteni tiun maŝinon, kiu nomiĝas laboristoj, ankaŭ kostos malpli. Se ĉiuj varoj estas malpli kostaj, tiam la laboro, kiu ankaŭ estas varo, kostos same malpli, kaj, kiel ni vidos poste, tiu varo laboro malaltiĝos proporcie pli ol ĉiuj aliaj varoj. Se la laboristo tiam daŭre fidas la argumentojn de la ekonomikistoj, li trovos ke la franko en sia poŝo kunfandiĝis kaj ke restos al li nur kvin soldoj[18].

Al tio la ekonomikistoj diros al vi: Nu ja, ni ja koncedas ke la konkurenco inter la laboristoj, kiuj sub regado de liberkomerco certe ne malpliiĝos, tre baldaŭ harmoniigos la salajrojn kun la malalta prezo de la varoj. Sed aliflanke la malalta prezo de la varoj pliigos la konsumadon; la pli granda konsumado postulos pli fortan produktadon, kiu siavice sekvigos pli fortan

18 Soldo (france: sou) estis monero de kvin centonoj de franko. -vl

postulon je laborfortoj, kaj tiun pli fortan postulon je laborfortoj sekvos altiĝo de la salajroj.

La tuta ĉi argumentado resumiĝas per jeno: La liberkomerco pliigas la produkt-fortojn. Kiam la industrio estas kreskanta, kiam la riĉaĵo, kiam la produktfortoj, kiam unuvorte la produktada kapitalo pliigas la postuladon je laboro, tiam kreskas ankaŭ la prezo de la laboro kaj sekve la salajro. La plej favora kondiĉo por la laboristo estas la kresko de la kapitalo. Kaj oni devas koncedi tion. kiam la kapitalo restas senŝanĝa, tiam la industrio ne nur restas senŝanĝa, sed retropaŝas, kaj tiukaze la laboristo estas la unua viktimo. Li pereas antaŭ la kapitalisto. Kaj en la kazo, kiam la kapitalo kreskas,, do en tiu, kiel dirite, plej bona kazo por la laboristo, kio tiam estas lia sorto? Li ankaŭ pereos. La kreskado de la produktiva kapitalo entenas en si la akumuladon kaj koncentriĝon de la kapitaloj. La centriĝo de la kapitaloj havas la sekvon de pli granda labordivido kaj pli granda aplikado de maŝinoj. La pli granda labordivido detruas la apartan lertecon de la laboristo; kaj per tio ke ĝi metas en la lokon de tiu aparta lerteco laboron kiun povas fari ĉiu, ĝi pliigas la konkurencon inter la laboristoj.

Tiu konkurenco fariĝas tiom pli forta, ĉar la labordivido donas al la laboristo la rimedon fari sola la laboron de tri.

La maŝinoj produktas la saman rezulton multe pli grandskale. La kresko de la produktiva kapitalo, devigante la industriajn kapitalistojn labori per ĉiam kreskantaj rimedoj, ruinigas la malgrandajn industriistojn kaj ĵetas ilin en la proletaron. Poste, ĉar la interezkvoto malpliiĝas laŭ la mezuro en kiu la kapitaloj akumuliĝas, la malgrandaj rentuloj kiuj jam ne povas vivi per siaj rentoj estos devigitaj lanĉi sin en la industrion kaj poste alt-

igi la nombron da proletoj.

Fine, ju pli la produktiva kapitalo grandiĝas, des pli ĝi estas devigata produkti por merkato kies bezonojn ĝi ne konas, des pli la produktado antaŭiras la bezonon, des pli la propono provas devigi la postulon kaj pro tio la krizoj grandiĝas je intenso kaj rapido. Sed ĉia krizo, siavice, akcelas la centriĝon de la kapitaloj kaj ampleksigas la proletaron.

Tiel, laŭ la mezuro en kiu la produktiva kapitalo kreskas, la konkurenco inter la laboristoj kreskas en multe pli forta proporcio. La rekompenco de la laboro malpliiĝas por ĉiuj, kaj la laborŝarĝo pliiĝas por iuj.

1829 ekzistis en Manĉestro 1.088 ŝpinistoj, kiuj estis dungitaj en 36 fabrikoj. 1841 ekzistis jam nur 448, kaj tiuj laboristoj servis 53.353 ŝpinilojn pli ol la 1.088 laboristoj de 1829. Se la manlaboro kreskintus en la sama proporcio kiel la produktivo, tiam la nombro da laboristoj devintus kreski al 1848; la teĥnikaj pliboniĝoj do senlaborigis 1.100 laboristojn.

Ni konas anticipe la respondon de la ekonomikistoj. Tiuj senlaborigitaj laboristoj, diras ili, trovos alian okupiĝon. S-ro d-ro Bowring ne preterlasis ree prezenti tiun argumenton ĉe la ekonomikista kongreso. Sed li ankaŭ ne preterlasis malpruvi sin mem.

En 1835 <*(1848)* erare: 1833; *(1885, 1892* kaj *1895)* erare: 1838>, s-ro d-ro Bowring faris paroladon en la malalta ĉambro[19] pri la 50.000 teksistoj de Londono, kiuj delonge suferas malsaton sen povi trovi tiun novan okupiĝon kiun la liberkomercistoj esperigas al ili.

19 de la brita parlamento. -vl

Ni aŭdu la plej frapajn teksterojn de tiu parolado de s-ro d-ro Bowring:

> *„La mizero de la manteksistoj”*, diras li, *„estas la neevitebla sorto de ĉia laboro kiu lerniĝas facile kaj ĉiumomente povas anstataŭiĝi per malpli kostaj rimedoj. Ĉar en tiu ĉi kazo la konkurenco inter la laboristoj estas eksterordinare granda, la plej eta malpliiĝo de la postulo alkondukas krizon. La manteksistoj troviĝas iel metitaj ĉe la plej ekstrema limo de la homa ekzistado. Unu paŝon pli, kaj ilia ekzisto fariĝas neebla. La plej eta puŝo sufiĉas por ĵeti ilin en la karieron de la pereo. La progreso de la meĥaniko, per tio ke ĝi forigas pli kaj pli la manlaboron, alkondukas neeviteble dum la transiĝ-epoko portempajn suferojn. La nacia bonfarto aĉeteblas nur je la prezo de kelkaj individuaj malbonaĵoj. Oni progresas en la industrio nur sur la kostoj de la malfruiĝantoj; kaj el inter ĉiuj malkovraĵoj, la vaporteksilo estas tiu kiu pezas je la plej granda pezo sur la manteksistoj. Jam en multaj artikloj kiuj fariĝis mane, la teksisto estis metita ekster la batalo, sed li estos ankaŭ daŭre venkota en multaj aĵoj kiuj hodiaŭ produktiĝas ankoraŭ mane.”*
>
> *„Mi tenas”*, diras li aliloke, *„enmane korespondaĵon de la ĝeneralguberniestro de Orient-Hindio kun la Orienthindia Kompanio. Tiu korespondaĵo koncernas la teksistojn de la distrikto de Dakko. La guberniestro diras en siaj leteroj: Antaŭ kelkaj jaroj la Orienthindia Kompanio ricevis ses ĝis ok milionojn da pecoj de katuno, produktitaj sur hejmaj manteksiloj. La postulo falis konstante kaj estis reduktita al proksimume unu miliono da pecoj.*

*En tiu ĉi momento ĝi preskaŭ ĉesis. Eĉ pli. En la jaro 1800 Nordameriko ricevis el Hindio preskaŭ 800.000 pecojn da katuno. En la jaro 1830 ĝi ricevis jam eĉ ne 4.000 pecojn. Fine oni ŝipe transportis en la jaro 1800 unu milionon da pecoj de katuno al Portugalio. 1830 Portugalio ricevis ne pli ol 20.000 pecojn.*

*La raportoj pri la mizero de la hindiaj teksistoj estas teruraj; kaj kio estis la kaŭzo de tiu mizero?*

*La apero de anglaj produktoj sur la merkato, la produktado de la artiklo per la vaporteksilo. Tre granda kvanto da teksistoj pereis en la mizero. La resto transiris al aliaj okupiĝoj, nome al kamparaj. Ne povi ŝanĝi sian okupiĝon egalas al mortkondamno. Kaj en tiu ĉi momento la distrikto de Dakko estas invadita de anglaj fadenoj kaj teksaĵoj. La muslino de Dakko, fama en la tuta mondo pro sia beleco kaj firmeco, sekve al la konkurenco de la anglaj maŝinoj ankaŭ malaperis. En la tuta historio de la metio oni eble penos trovi similajn suferojn kiel tiujn kiujn tiel devis suferi tutaj klasoj en Orienthindio."*

La parolado de s-ro d-ro Bowring estas tiom pli rimarkinda, ke la faktoj menciitaj en ĝi estas ĝustaj kaj la senenhavaj paroloj, per kiuj li provas mildigi ilin, estas ja hipokritaj, kiel ĉiuj paroladoj de la liberkomercistoj. Li prezentas la laboristojn kiel produktadrimedojn, kiujn oni devas anstataŭigi per malpli kostaj produktadrimedoj. Li ŝajnigas vidi en la laboro pri kiu li parolas absolute esceptan laboron, kaj en la maŝino kiu ekstermis la teksistojn, same esceptan maŝinon. Li forgesas, ke ne ekzistas manlaboro kiu iun tagon ne frapeblas de la teksista sorto.

*„La konstanta celo kaj la tendenco de ĉia perfektiĝo en la meĥaniko konsistas efektive en tio, komplete malhavebligi la homan laboron aŭ malaltigi ties prezon, per tio ke oni metas la laboron de virinoj kaj infanoj en la lokon de la plenkreska vira laboristo aŭ la simplan helpulon en la lokon de la lerta manlaboristo. En la plej multaj ŝpinejoj de akvofadeno, en la angla* throstle-mills*, la ŝpinado estas farata nur de knabinoj deksesjaraj aŭ malpli aĝaj*[20]*. La enkonduko de la aŭtomata fabrikŝpinilo anstataŭ la mana fabrikŝpinilo sekvigas la maldungon de la plej multaj ŝpinistoj kaj konservadon de infanoj kaj junuloj."*

Tiuj vortoj de la pasia liberkomercisto, de s-ro d-ro Ure, taŭgas por kompletigi la konfesojn de s-ro Bowring. S-ro Bowring parolas pri kelkaj individuaj suferoj kaj diras samtempe ke tiuj individuaj suferoj pereas tutajn klasojn; parolas pri portempaj suferoj en la tempo de la transiĝo, kaj samtempe li ne kaŝas ke tiuj suferoj de transiĝo estis por la plej multaj homoj la transiĝo de vivo al morto kaj por la resto la transiĝo de pli bona al pli malbona situacio. Kiam li poste diras, ke la suferoj de tiuj laboristoj estas nedisigeblaj de la progreso de la industrio kaj necesaj por la nacia bonfarto, tiam li diras simple, ke la bonfarto de la burĝa klaso havas kiel necesan kondiĉon la suferon de la laborista klaso.

La tuta konsolo kiun donas s-ro Bowring al la laboristoj kiuj tie pereas, kaj entute la tuta doktrino de kompenso, kiun prezentas la liberkomercistoj, resumiĝas jene:

---

20 <Ĉe Andrew Ure „The Philosophy of Manufactures ...", Londono 1861, p. 23: upwards [pli aĝaj]>

Vi miloj da laboristoj, kiuj pereas, ne malkuraĝiĝu. Vi povas morti tute trankvile. Via klaso ne eksterminiĝos. Ĝi estos ĉiam sufiĉe multnombra por ke la kapitalo povas amaspereigi ĝin sen ke ĝi devus timi neniigi ĝin. Cetere, kiel vi volas ke la kapitalo trovu utilan dungon, se ĝi ne zorgus por ĉiam konservi la ekspluateblan materialon, la laboristojn, por ekspluati ilin denove?

Sed kial ankoraŭ pritrakti kiel solvendan problemon la influon, kiun la realigo de la liberkomerco havos sur la situacio de la laborista klaso? Ĉiuj leĝoj kiujn la ekonomikistoj prezentis, de Quesnay ĝis Ricardo, estas starigitaj kun la supozo ke la malhelpoj kiuj katenas ankoraŭ la komercan liberecon ne plu ekzistas. Tiuj leĝoj konfirmiĝas sampaŝe kiel la liberkomerco realiĝas.

La unua el tiuj leĝoj estas ke la konkurenco reduktas la prezon de ĉia varo al la minimumo de ĝiaj produktadkostoj. Tiel la minimuma salajro estas la natura prezo de la laboro. Kaj kio estas la minimuma salajro? Tiu estas tute ĝuste tio kio necesas por produktigi la aĵojn neprajn por la konservado de la laboristo, por kapabligi lin nutriĝi iel kaj plu generi sian klason[21] tiom kiom necesas.

Ni ne kredu pro tio ke la laboristo havos nur tiun minimuman salajron, ni  ankaŭ ne kredu ke li havas tiun minimumon ĉiam.

Ne, laŭ tiu leĝo, la laborista klaso estos kelkfoje pli feliĉa. Ĝi havos kelkfoje pli ol la minimumon; sed tiu pluso estos nur la kompenso de tio kion ĝi havos en tempo de industria stagna-

21 Tiel en la germana versio. En la franca versio: ... sian rason. -vl

do malpli ol la minimumo. Tio signifas: Se oni en certa periode revenanta tempospaco, en tiu rondo kiun faras la industrio, pasante tra unu post la alia la fazojn de prospero, superproduktado, stagnado, krizo, sumigas ĉion kion la laborista klaso havis super kaj sub la necesaĵo, oni vidos ke sume ĝi ricevis nek pli nek malpli ol la minimumon; do la laborista klaso konserviĝos kiel klaso post multaj malfeliĉoj, mizeroj kaj kadavroj lasitaj sur la industria batalkampo. Sed ĉu gravas? La klaso daŭre ekzistas kaj, pli ol tio, ĝi estos pliiĝinta.

Sed tio ne estas ĉio. La progreso de la industrio liveras malpli kostajn ekzistrimedojn. Tiel brando anstataŭis bieron, kotono lanon kaj linon kaj la terpomo la panon.

Ĉar oni trovas ĉiam rimedojn por nutri la laboron per io malpli kosta kaj pli mizera, la minimuma salajro ĉiam malpliiĝas. Se tiu salajro komencis laborigi la homon por vivi, ĝi fine vivigas al la homo maŝinan vivon. Lia ekzisto havas ne alian valoron ol tiun de simpla produktforto, kaj la kapitalisto traktas lin laŭ tio.

Tiu leĝo de la varo laboro, de la salajra minimumo, pruviĝos laŭ la mezuro en kiu la antaŭsupozo de la ekonomikistoj, la liberkomerco, fariĝas vero, aktuala fakto. Tiel, el du aferoj unu: aŭ oni devas nei la tutan politikan ekonomion bazitan sur la antaŭkondiĉo de liberkomerco, aŭ oni devas koncedi ke la laboristojn sub tiu liberkomerco frapas la tuta rigoro de la ekonomiaj leĝoj.

Resume: en la nuna stato de la socio, kio estas do la liberkomerco? Ĝi estas la libereco de la kapitalo. Kiam vi faligis la kelkajn naciajn barojn kiuj ankoraŭ limigas la liberan disvolviĝon de la kapitalo, tiam vi nur komplete senĉenigis ĝian agad-

on. Tiom longe, kiom vi lasas daŭrigi la rilaton de dunglaboro al kapitalo, la interŝanĝo de la varoj povas okazi ja sub la plej bonaj kondiĉoj, ĉiam ekzistos klaso kiu ekspluatas kaj iu kiu estas ekspluatata. Fariĝas vere malfacile kompreni la pretendon de la liberkomercistoj kiuj iluzias ke la pli avantaĝa aplikado de la kapitalo malaperigos la kontraŭdiron inter industriaj kapitalistoj kaj dunglaboristoj. Tute male. La sola sekvo estos, ke la kontraŭdiro de tiuj du klasoj montriĝos ankoraŭ pli klare.

Oni supozu por momento, ke jam ne ekzistas grenleĝoj, nek komunumaj nek ŝtataj doganaĵoj, fine ke ĉiuj flankaj cirkonstancoj kiujn la laboristo povas hodiaŭ ankoraŭ konsideri la kaŭzoj de sia mizera situacio, komplete malaperis, kaj oni disŝiris same multajn kurtenojn kiuj malkaŝis al liaj okuloj la veran malamikon.

Li vidos, ke la liberiĝinta kapitalo sklavigas lin ne malpli ol tiu ĝenata de doganaj baroj.

Sinjoroj! Ne lasu vin imponi per la abstrakta vorto *libereco*. Libereco kies? Ĝi ne signifas la liberecon de la unuopa individuo fronte al alia individuo. Ĝi signifas la liberecon kiun ĝuas la kapitalo dispremi la laboriston.

Kial vi volas ankoraŭ sankcii la liberan konkurencon per tiu liberec-ideo, dum tiu liberec-ideo mem estas nur la produkto de stato bazita sur la libera konkurenco?

Ni montris kio estas frateco kiun la liberkomerco naskas inter la diversaj klasoj de unu sama nacio. La frateco kiun la liberkomerco starigus inter la diversaj nacioj de la tero estus apenaŭ pli frateca; signi la ekspluatadon en ĝia kosmopolita formo per la nomo de ĝenerala frateco, tio estas ideo kiu povis

fonti nur en la sino de la burĝaro. Ĉiuj detruaj fenomenoj kiujn sekvigas la libera konkurenco interne de lando, ripetiĝas en ankoraŭ pli giganta amplekso sur la mondmerkato. Ni ne bezonas pli longe halti ĉe la sofismoj kiujn la liberkomercistoj eldiras pri tiu temo kaj kiuj valoras same multe kiel la argumentoj de niaj tri premiitoj, la sinjoroj Hope, Morse kaj Greg.

Oni diras al ni ekzemple, ke la liberkomerco naskos internacian labordividon kaj per tio asignos al ĉiu lando produktadon en harmonio kun ĝiaj naturaj avantaĝoj.

Vi eble pensas, sinjoroj, ke la produktado de kafo kaj de sukero estas la natura destino de okcidenta Hindio.

Antaŭ du jarcentoj, la naturo, kiu apenaŭ enmiksiĝas en la komercon, metis tien nek kafon nek sukerkanon.

Kaj eble ne pasos duonjarcento kiam vi trovos tie nek kafon nek sukeron, ĉar orienta Hindio, per pli malmultekosta produktado, jam venke kontraŭbatalis tiun pretenditan naturan destinon de okcidenta Hindio. Kaj tiu okcidenta Hindio kun siaj naturaj riĉaĵoj estas jam same peza ŝarĝo por la angloj kiel la teksistoj de Dakko, kiuj ankaŭ de pratempo estis destinitaj teksi per la mano.

Kroma cirkonstanco estu neniam pretervidata: nome tiu, ke, same kiel ĉio fariĝis monopolo, ankaŭ niatempe ekzistas kelkaj industribranĉoj kiuj superregas ĉiujn aliajn kaj kiuj certigas al la popoloj kiuj plej uzas ilin, la superregadon en la mondmerkato. Tiel en la internacia komerco nur kotono havas multe pli da komerca graveco ol ĉiaj aliaj krudmaterialoj, uzataj por produktado de vestaĵoj, kune. Estas vere ridinde kiel la liberkom-

ercistoj indikas la kelkajn specifaĵojn en ĉiu industribranĉo por kontraŭpezi ilin kontraŭ la produktaĵoj de ĉiutaga uzado kiuj produktiĝas plej malmultekoste en landoj kie la industrio estas la plej evoluinta.

Se la liberkomercistoj ne povas kompreni kiel iu lando povas riĉiĝi surkoste de alia, ni ne bezonas miri pri tio, ĉar la samaj sinjoroj volas eĉ malpli kompreni, kiel ene de lando unu klaso povas riĉiĝi surkoste de alia.

Sed ne kredu, sinjoroj, ke, se ni kritikas la komercliberecon, ni intencas defendi la doganprotektan sistemon.

Oni povas kontraŭbatali la konstitucian reĝimon sen pro tio esti amiko de absolutismo.

Cetere, la doganprotekta sistemo estas nur rimedo kreskigi en iu lando la grandan industrion, tio signifas sendependigi ĝin de la mondmerkato; kaj ekde la momento, en kiu oni dependas de la mondmerkato, oni jam dependas pli aŭ malpli de la liberkomerco. Krome la doganprotekta sistemo disvolvas la liberan konkurencon ene de lando. Pro tio ni vidas ke en landoj, kie la burĝaro komencas respektigi sin kiel klason, ekzemple en Germanio, ĝi faras grandajn klopodojn por havi protektajn doganaĵojn. Tiuj estas por ili armiloj kontraŭ la feŭdeco kaj kontraŭ la absoluta registaro, kaj rimedo centrigi siajn fortojn, realigi la liberkomercon interne de la sama lando.

Sed ĝenerale, niatempe, la protekta sistemo estas konservativa, dum la liberkomerca sistemo estas detrua. Ĝi dissolvas la malnovajn naciecojn kaj puŝas ĝisekstreme la antagonismon de la burĝaro kaj proletaro. Unuvorte, la sistemo de komerca libereco urĝas la socian revolucion. Estas nur en tiu revolucia sen-

Karlo Markso: Parolado pri la demando de liberkomerco

co, sinjoroj, ke mi voĉdonas favore al la liberkomerco.

# Postparolo de la tradukinto

Kiuj estas, por la amaso de salajruloj, en la kapitalismaj industrilandoj kaj en la same kapitalismaj evolulandoj, la sekvoj, se iliaj registaroj decidas aŭ liberkomercon aŭ pli aŭ malpli striktan sistemon de doganprotektismo? Regule revenas tiu demando, ekzemple ĝi nun ree aktualiĝas dum la tutmonda krizo kiu eksplodis en oktobro 2008 unue en la financa kampo kaj kiu nun, en 2009, disvastiĝas en praktike ĉiujn aliajn kampojn kaj havas sekvojn en ĉiuj landoj de la terglobo. En tiu ĉi momento rimarkeblas fortaj tendencoj de pluraj registaroj de industrilandoj reveni al la antaŭe kondamnita protekto per doganaĵoj.

La respondo, kiun donis al tiu demando Karlo Markso en la jaro 1849 kaj poste Frederiko Engelso, en sia interesa antaŭparolo preskaŭ kvardek jarojn poste, en la jaro 1888, estas ankaŭ hodiaŭ valida por kompreni la situacion en kiu troviĝas la grandega plimulto de la loĝantaro de ĉiuj landoj kaj por trovi sian perspektivon.

La nuancoj, kiujn intermetis la historio, estas materialo por certe interesaj diskutoj.

La tradukon mi bazis, por la Engelsa teksto, sur ties germana eldono kaj, por la Marksa teksto, sur la franca originalo, konsultante tamen la germanan eldonon de Berlino (GDR) de 1972. Kelkaj formuloj aperas sinonime, ekz-e „doganprotekta sistemo” kaj „protektdogana sistemo” - kiuj ambaŭ celas sistemon de protektado kiun starigas registaro por protekti la industrion de sia lando per doganaĵoj, aŭ „terposedantoj”, „terprop-

rietuloj”, „grundposedantoj”, „grundproprietuloj” ktp., parte laŭ la franca aŭ la germana eldono.

Kara leganto, mi ŝatus atentigi vin ke vi ja povas kontribui al perfektigo de tiu ĉi traduko per indiko de eraroj aŭ per konsilo de pli taŭga ekvivalento. Legantoj de postaj eldonoj dankos vin.

*Vilhelmo Lutermano,*
*Pedro Betancourt, en marto 2009*

**Monda Asembleo Socia (MAS)** …

… estas asocio fondita en la jaro 2005 de Esperantistoj kiuj, inspiritaj de la artikoloj de *Le Monde diplomatique en Esperanto* *http://eo.mondediplo.com* volas ne nur legi, sed ankaŭ diskuti kaj agi.

Ĝi estas strikte bazdemokratia, travidebla (por siaj membroj), progresema organizaĵo, kiu funkcias nur pere de retpoŝto kaj Interreto. Ĝi partoprenas en la Mondaj kaj laŭeble regionaj Forumoj kaj referencas en sia statuto por sia agado la tekstojn kunigitajn en tiu ĉi libro. Aliĝo kaj membreco estas senpagaj. Ĝia retejo: *http://mas-eo.org* enhavas ĉiujn interesajn informojn pri MAS, kaj krome multajn legindajn artikolojn, tradukitajn aŭ memverkitajn de la membroj.

Ĉiu membro rajtas ne nur publikigi en la retpaĝo de MAS siajn tekstojn, sed ankaŭ publikigi librojn en la eldonejo de MAS, kondiĉe ke li havas aŭ trovas la rimedojn por presado - ĉar aliĝo kaj membreco estas senpagaj, MAS ĝenerale ne disponas pri la rimedoj pagi al verkemuloj la eldonadon de libroj.

Tamen, ĝis nun eldoniĝis jam pluraj libroj:

**- C. F. Ramuz: Aline** (novelo de la franclingva svisa aŭtoro en traduko de nia fama René de Saussure, reeldonita post la unua eldono en 1911), 2007

**- Arturo Ŝniclo: Rondo (Dek dialogoj); La fianĉino (Skizo), kun eseo pri verkoj de Ŝniclo de Hartmut Scheible**, en trad. de V. Lutermano, 2007

**- Karlo Markso: Salajro, prezo kaj profito** (prelego pri bazaj ekonomiaj fenomenoj antaŭ internaciaj delegitoj de la laborista movado), en traduko de V. Lutermano, 2007

**- Kubaj infanrakontoj**, trad. de Jozefo de Jesús Campos Pacheco kun ilustraĵoj de Danny Daniel Pereyra, 2007

**- GBEGLO Koffi: Esperantujismo**, originale verkita, 2008

**- Johano Besada: Eseoj**, originale verkitaj, 2008

**- Karlo Markso: Nerefuteblaj citaĵoj**, trad. V. Lutermano, 2008

**- Fidel Castro Ruz: Dialogo de civilizacioj** (2 paroladoj), trad. Amparado Cisnero, 2009

**- Dominique Vidal: Kiel Israelo elpelis la palestinanojn**, trad. de V. Lutermano, 2009

**- Ĉarto de la Unuiĝintaj Nacioj, Universala Deklaro de Homrajtoj, Konsilantaro pri Homrajtoj, Internacia Traktato pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, Internacia Traktatoj pri la Civilaj kaj Politikaj Rajtoj, Konvencio pri la Rajtoj de la Infano, Konvencio pri la Rajtoj de Handikapitoj, Protokolo pri abolo de mortpuno, Konvencio pri Indiĝenaj kaj Tribaj Popoloj** - Tekstoj Esperantigitaj de Vilhelmo Lutermano, 2009

**- Karlo Markso: Dunglaboro kaj kapitalo**, trad. V. Lutermano, 2009

**- Karlo Markso: Pri liberkomerco, kun antaŭparolo de Frederiko Engelso,** trad. V. Lutermano, 2009 (tiu ĉi libro)

La libroj de MAS akireblas ĉe la kutimaj librovendejoj en Esperantujo, precipe ĉe tiuj de la Universala Esperanto-Asocio (UEA) kaj de la Flandra Esperanto-Ligo (FEL).

Enpaĝigita de Monda Asembleo Socia (MAS)
per OpenOffice 3.0.0 sub Mandriva Linukso 2009.0
en marto 2009 kun litertiparo Liberation Serif kaj Liberation Sans.

Presita 2009 en Germanio

ISBN 978-2-918300-02-1